# En betleĥema gastejo

(originalo ne konata) • ADORU 243




2. kaj tio, kvankam Vi venis
ĉielan fajron bruligi,
per Via nobla sufero
de mond' pereon haltigi,
kaj kvankam esti Vi volis
por ni de l' vivo la pano,
kaj nin por ĉiam regali
per paco, ĝojo kaj amo.

3. Dum vulpo kavon posedas
kaj birdo sian nesteton,
por Vi ekmankis gastejo,
Vi devis serĉi trogeton.
Kaj kial inter la homoj
militoj estas kaj krimoj?
Ĉar por Vi mankas la loko
en multaj homaj animoj.

EN BETLEĤEMA GASTEJO (originalo ne konata) • NV 113* • 2001 en ADORU 243